

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En 1950 Ivo Lapenna instruis al la esperantistaro la arton paroladi. Lia verko *Retoriko* alportis tiam brikon, kiu ankoraŭ mankis por la konstruo de nia domo Esperantujo.

A.- La voĉo de Ivo Lapenna ne parolis en dezerto, sed antaŭ publiko jaron post jaro pli nombra. La paroladoj de Ivo Lapenna fariĝis eĉ gravaj eventoj en la esperanta vivo, ĉar ili esprimas arte kaj firme la sentojn kaj aspirojn de la esperanta popolo.

Cl.- Dum la inaŭguraj paroladoj en mondaj kongresoj ofte estas adicioj de banalaĵoj. Kontraŭe la vortoj de Ivo Lapenna, kiel tiuj de Edmond Privat kaj Ludoviko Zamenhof, estis ĉiam momentoj de meditado pri nia idealo.

A.- Estas do kun grandega ĝojo, ke ni vidas aperi en nia literaturo kolekto de la plej gravaj paroladoj kaj prelegoj de Ivo Lapenna.

Cl.- Titolas tiu nova libro : *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*.

A.- Ne plu estas necese prezenti la UEA-prezidanton Ivo Lapenna. En Montevideo li majstre advokatis nian kaŭzon kaj nun li dinamisme gvidas nian movadon.

Cl.- Povante nun legi la paroladojn, kiuj ĉiam tiom impresas la esperantan publikon, ni malkovras la riĉon de la penso de Ivo Lapenna. Ni komprenas, kial la esperanta popolo sentis jaron post jaro sian fidon kreski por tiu digna posteulo de la pioniroj de esperanto.

A.- Gaston Waringhien en sia antaŭparolo al la *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* de Ivo Lapenna desegnas paralelon inter la du homoj, kiuj ludis en nia afero la gravan rolon de personigo de nia movado. Edmond Privat kaj Ivo Lapenna montris sin ambaŭ bonegaj sciantoj de la lingvo, vervaj stilistoj kaj brilaj oratoroj ; ambaŭ per sia kleriĝo atingis la plej altajn universitatajn ŝtupojn ; ambaŭ pruvis sian lertecon manovri en la dornoplenaj medioj diplomatiaj ; ambaŭ kvalifikiĝis kiel figuroj de internacia klaso ; kaj al ambaŭ tia eminenteco alportis ne malmulte da envio kaj atakoj.

Cl.- En Ivo Lapenna la esperanta popolo havas nun estron, kiun multaj popoloj povus envii. Legante la paroladojn de tiu estro de naskiĝanta popolo, oni sentas sin fieri esti civitano de la esperanta mondo. Tiun senton devas ricevi kiom pli forte la personoj, kiuj aŭdas la oratoron.

A.- En sia enkonduko al tiu elekto de paroladoj Ivo Lapenna mem instigas nin utiligi « *komplete aŭ parte* » liajn tekstojn por « *prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj pri la koncernaj demandoj. Tio estas la ĉefa celo de la publikigo kaj ĉiu povas laŭbezzone uzi tiun materialon.* »

Cl.- Ni esperas, ke la esperantistaro obeos tiun instigon. Anstataŭ inaŭguri grupajn kunvenojn per mallertaj sensignifaj paroladoj oni povus provi rediri iom oratore unu el la festparoladoj de Ivo Lapenna.

A.- Oni ankaŭ povas aliel inspiroĝi de tiuj paroladoj kaj prelegoj. Dum grupaj kunvenoj oni povus peti la grupanojn respondi al demandaro pri elektita teksto. Por serĉi la respondojn la grupanoj devus atente legi kaj mediti la dirojn de Ivo Lapenna. Poste ili verŝajne pli klare povos esprimi sian propran penson.

Cl.- En tiu libro oni povas ankaŭ studi la ĉefajn etapojn de la evoluo de la esperantismo dum la dektri lastaj jaroj. Konkizaj informoj en piednotoj lokigas tempe kaj cirkonstancie ĉiun unuopan paroladon aŭ prelegon, kaj donas aliajn necesajn klarigojn.

A.- Por riĉigi tiujn studojn oni povus ekspozicii kelkajn gazet-numerojn kaj librojn de la koncerna momento. Oni tiam komprenos, kiom kreskis nia movado dum la dekkvin pasintaj jaroj.

Cl.- Grafiko pri la laboro kaj progreso de UEA inter 1949 kaj 1958 helpos la grupgvidantojn en tiu pedagogia laboro. Havante limigitan vidon super loka grupo ofte stagnanta, tro ofte la grupanoj pensas, ke same esperanto trankvile stagnas en la tuta mondo.

A.- Fakte kaj ĝojige ne estas tiel. Sed nur vizitado al universalaj kongresoj kaj atenta studo de la gazetaro kaj de la novaj libroj, kaj komparoj kun kio ekzistis antaŭ kelkaj jaroj, povas nin konvinki pri la vivanteco de nia lingvo.

Cl.- Povu la lego de la paroladoj de Ivo Lapenna instigi multajn esperantistojn entrepreni tiun komparon.

A.- Ni revenos al tiu libro por longe citi dirojn de Ivo Lapenna. Hodiaŭ ni kontentiĝu konkludi nian elsendon per mallonga citado el tre bela parolado de Ivo Lapenna dediĉita al la temo : *La internacia lingvo kiel esprimo kaj antaŭeniganto de universalismaj tendencoj*. Aŭdu liajn dirojn :

Cl.- « *Ni ne estas iaj revantaj fantaziuloj, kiuj naĝante ie en nuboj forgesas la teron, nek ni estas iaj strutoj, kiuj enŝovinte la kapon en la sablon, opinias ke ĉio estas en ordo ! Ni bone vidas la realaĵon, sed ni ankaŭ komprenas, ke en la hodiaŭo ĉiuj ĉi ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj ideoj kontraŭaĵoj havas du ĝeneralajn trajtojn kaj manifestas du esence kontraŭajn tendencojn sur ĉiuj kampoj : unuflanke troviĝas la tendenco al universalismo kaj aliflanke la tendenco al egoisma regionismo.*

A.- *La konstanta progresado de universalismo, spite al artefaritaj baroj kaj malhelpoj, estas senduba fakto. Sur la ekonomia kampo ĝi esprimiĝas per ĉiam pli forta interdependeco de la diversaj mondopartoj.*

Cl.- *Sur politika kampo ĝi montriĝas en la klopodoj formi superŝtatajn internaciajn organismojn, kia estis la Societo de Nacioj kaj estas hodiaŭ la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.*

A.- *Sur kampo ideoj, la scienco kaj arto, kiuj ĝis antaŭ nelonge estis apartenaĵo de fermitaj rondoj, celas direktiĝi ĉiam pli al la tuta homaro.*

Cl.- *Eĉ la lastaj grandaj militoj – tiuj plej krimaj atakoj kontraŭ la homeco, tiuj monstroj, detruantaj la tuthomaran solidarecon – estas, tamen, samtempe pruvoj pri la universaleco de la mondo. »* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-